# HUNGARA
# ANTOLOGI

laktis: K. KALOCSAY

dukis: J. BAGHY
K. BODÓ
L. HALKA
F. SZILÁGYI
L. TOTSCHE

2919
4892

40

nis: LITERATURA MONDO, BUDAPEST 19

Ĉi tiu
libro
estas la
**u n u a**
el
la libroj
de
Asocio de
Esperantistaj
Libro-
Amikoj
(Literatura
Mondo)
en
la jaro
1933
...ngarujo
...idapest,
IX.,
...r ucca
7

William W. Carpenter
Escondido
California
May 1st 1934

LITERATURA MONDO

# HUNGARA ANTOLOGIO

REDAKTIS:
K. KALOCSAY

KUNLABORIS:
J. BAGHY, K. BODÓ, L. HALKA,
F. SZILÁGYI, L. TOTSCHE

Eldono de Literatura Mondo, Budapest, 1933

Tiu ĉi libro
estas la unua el la serio 1933
de Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, Budapest

Készitette a Pestvidéki Nyomda Vácon — A nyomdáért Bénik Gyula felelős

# Antaŭparolo

Redaktante ĉi tiun antologion de la hungara literaturo, mi bone konsciis, ke mi surprenis taskon, kiun mi ne povos perfekte plenumi, pri kiu mi devos kontentiĝi je pli-malpli doloraj kompromisoj.

Premite unuflanke de la, kvankam vasta, tamen limigita amplekso de la libro, aliflanke de la embaraso de riĉeco rilate la prezentindan materialon, unue mi devis decidi, ke mi rezignos pri la kompleteco por doni prefere interesan legaĵon. Tial mi nenion publikigas el la malnova proza literaturo, kiu hodiaŭ jam apenaŭ povas havi komunan intereson al internacia publiko. La vicon de la prozistoj do komencas *Jókai*.

Aliflanke, la tute nova generacio prezentas novan malfacilaĵon. La junaj verkistoj estas tiel grandnombraj, ke ili, prezentitaj per po unu novelo aŭ poemo, postulus preskaŭ la saman amplekson, kian havas la tuta libro. Mi do, post longa konsiderado, devis ilin tute preteri kaj prezenti nur tiujn aŭtorojn, kiuj komencis sian verkadon antaŭ la milito. Mi konscias, ke tio estas manko, sed ĝi havas ankaŭ avantaĝon: tiamaniere la antologio prezentas nur aŭtorojn, kies valoro eltenis la kritikon de certa tempo. La junan generacion mi esperas iam konigi en aparta volumo.

Por ke la libro, inter tiaj cirkonstancoj, ne estu minacata per tio, ke ĝi aspektas malfreŝa kaj eksmoda, mi klopodis publikigi de la vivantaj aŭtoroj freŝajn pecojn, kiuj per sia tem-elekto aŭ alimaniere tuŝas la sferon de la aktualeco. Mi ripetas, ke mi volis doni ne tiom dokumenton pri la hungara literaturo, kiom interesan kaj plezure legeblan legaĵon.

Por doni ĝeneralan trarigardon pri la hungara literaturo, ni publikigis la skizon de *M. Babits* verkitan okaze por *franca*, do eksterlanda publiko. Sed ĉar ĉi tiu trarigardo, ĝuste ĉar ĝi celas nur tute ĝeneralan orientadon, estas tro skiza rilate la opajn aŭtorojn, antaŭ la verkoj de ĉiu aŭtoro ni donas malgrandan karakterizan noton. Ĉi tiujn notojn kaj ankaŭ la tradukon de la artikolo de *Babits*, prizorgis *L. Totsche*.

La antologio rezultis el la fervora kunlaboro de *J. Baghy*

*K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi* kaj *L. Totsche*. Sub la tradukoj oni trovos la nomon de la respektiva tradukanto. Tradukoj ne subskribitaj estas faritaj de mi. Por lokŝparo mankas el la libro la plejparto de tiuj poemtradukoj el la hungara lingvo, kiuj aperis en mia *Eterna Bukedo* kaj en la *Poemaro el Hungarlando* de *Szilágyi*. Nur kelkajn, parte tralaboritajn, mi alprenis pro specialaj kaŭzoj.

Rilate la neologismojn, ni tenis nin al la zamenhofa principo »iom post iom«, krome al la principo, laŭ kiu oni devas apartigi la poezian vortprovizon de la vulgara. La komencanto trovos en la libro tre multe da legaĵo, en kiu lin ne ĝenos eĉ unu vorto netrovebla en la Plena Vortaro. Aliflanke en kelkaj prozaj pecoj *(Mitologio* de *Babits, Ĉe Mühlhausen . . .* de *Szomory)*, kie la stilo kaj vortriĉo de la originalo tion postulas, ni estis malpli severaj, ni rigardis ilin kun la sama mezuro kiel la poemojn. Ni opiniis: kiu havas plezuron pri tiaj ĉefverkoj de stilo, tiu havos ankaŭ komprenon pri la *artaj* bezonoj de nia literatura lingvo. Ni kredas, ke per la kompromiso, kiun tiamaniere ni faris inter riĉo kaj simplo, progreso kaj konservativeco, oni ĝenerale estos kontenta. La vortojn netroveblajn en la Plena Vortaro cetere ni klarigis en la fino de la libro. Oni apenaŭ trovos pli ol dekduon da ili ne registritan en iu fama vortaro.

Mi ne volas kun grandaj vortoj entuziasmi pri nia laboro: ni faris nian eblon por la celo: konigi hungarajn literaturajn trezorojn kaj samtempe doni kiel eble valoran kontribuaĵon al la Esperanta literaturo. Se ni iagrade sukcesos pri tio, ni havos riĉan kompenson por niaj klopodoj.

**K. Kalocsay**

# KLARIGOJ KAJ NOTOJ

# Vortklarigoj

**pri vortoj ne registritaj en la Plena Vortaro de SAT. Ili plejparte estas troveblaj en vortaroj: (b): *Boirac;* (c): *Christaller;* (f): *Fulcher-Long;* (gm): *Grosjean-Maupin;* (g): *Grabowski;* (v): *Verax;* (w): *Wüster;* (z): *Zamenhof;* Vortoj kun (*) mankas al tiuj vortaroj; kelkaj (bohema, morna, sakri, sledo, stumbli, trista) estis jam plurfoje uzataj de bonaj verkistoj. Dek vortoj estas proponitaj en la Parnasa Gvidlibro.**

**Pri io ne trovebla en la suba listo, oni rigardu sub Diversaj Klarigoj.**

*adoleski* (w): seksmaturiĝi, vir(in)iĝi,
*agapo* (z): amfesteno de l' unuaj kristanoj,
*ascendi* (c): supreniri,
*baŭmi* (b): obstinstariĝi,
*bohema* (*): fantazie vivanta en gaje portata mizero,
*bunta* (c): multkolora,
*damni* (g): kondamni je infero.
*defraŭdi* (w): ŝteli ion ofice konfiditan,
*descendi* (c): malsupreniri,
*dura* (gm): malmola,
*ekshibicia* (*): malsane sinnudigema,
*flotilo* (*): militŝipetaro,
*gracila* (w): maldikkorpa,
*horori* (g): esti terurita,
*humida* (g): malseka,
*jubili* (c): ĝojkrii,
*koagli* (b): solidiĝi (sango),
*kriĉi* (*): akcipitre krii,
*kviki* (c): akre pepi,
*kariatido* (b): subkornica statuo,
*langvoro* (b): korpa kaj anima malstreĉiĝo,
*lici* (*): esti permesata,
*mesaĝo* (*): sendita sciigo,
*miraĝo* (b): vidtrompa aerspeguliĝo,
*morna* (*): preme malhela, malgaja,
*moskatelo* (b): vino kun speciala aromo,
*nababo* (b): hinda princo; riĉegulo,
*nana* (v): nenormale etkreska,
*nomumi* (*): difini por posteno, (subsenco de *nomi*),
*nupto* (*): geedziĝo,
*obscena* (gm): pudorindigniga,
*obskura* (f): malluma,
*pigra* (*): maldiligenta,
*pluvialo* (b): pastra ceremonia vesto,
*poltrona* (*): malkuraĝa,
*ponio* (*): speco de etkreska ĉevalo,
*povra* (*): kompatinda,
*predo* (*): rabakiraĵo,
*rara* (g): malofta, maldensa,

*retikulo* (*): mansaketo,
*rustika* (gm): kampulmaniera,
*sakri* (*): blasfemi aŭtomate, ne intencante ofendi Dion,
*salamo* (*): speco de kolbaso, dika, malmole farĉita el malgrasa porkviando, tre longe konservebla,
*sarmento* (v): volvkrampo de kreskaĵoj,
*sinki* (c): fali milde, kvazaŭ retenate,
*skafandro* (b): subakvista ekipaĵo,
*sledo* (*): glitveturilo,
*sordino* (*): sonobtuzigilo,
*stumbli* (*): falpuŝiĝi,
*sturmi* (g): kurataki,
*ŝminko* (z): vizaĝŝmiraĵo,
*tenera* (b): karesema,
*torporo* (gm): sensentiĝo pro nervopremo,
*trista* (*): malĝoja,
*vagabondo* (c): landvojvagulo.
*vilao* (z: villo): somerdomo.

# Diversaj klarigoj

*Mallongigoj*: *fr:* franca; *germ*: germana; *gr*: greka; *it*: itala; *lat*: latina.

*Aedilis:* Roma oficisto.

*Anakreono:* greka kantisto de amo, vino, vivĝojo (ĉ. 600 a. K.)

*Ariono:* duonmita greka kantisto. Laŭ Herodotos ŝipanoj lin volis murdi por rabi lian monon. Li petis kiel lastan favoron: kanti sian cignokanton. Poste la ŝipanoj lin ĵetis en la maron, sed delfeno, allogita de l' kanto, lin prenis sur sian dorson kaj portis al la bordo.

*Bácska* (baĉka): landparto de Hungarlando, nun ĝi plejparte apartenas al Jugoslavio.

*Bergeronette* (fr.: berĵeronett): paŝtistineto.

*Camena* (kamena): nomo de fontnimfoj en la Roma mitologio. Poste oni ilin identigis kun la grekaj Muzoj.

*Cato* (kato): la granda Roma respublikano, kiu post la venko de Julio Cezaro sin mortigis.

*Ceres, Bacchus, Venus:* manĝo, drinko, amo.

*Cocytus* (kocitus): (greke: Kokytos): mita rivero en la romangreka submondo.

*Comme il faŭt* (fr.: komilfo') kiel oni devas, kiel decas.

*Comme la belle fée de l' été* (fr.: kom la bel fe dölete'): kiel la bela feino de l' somero.

*Comme vous étes charmante* (fr.: kom vuzet' ŝarmaat'*): kiel ĉarma vi estas.

*Ĉardaŝo:* hungara popoldanco.

*Da capo* (it.: da kapo): ree dekomence.

*Danaidinoj:* laŭ la greka mito 50 filinoj de Danao. Aigyptos, ĝemelfrato de Danao svatas pri ili por siaj 50 filoj. Danao malvolonte konsentas, sed liaj filinoj, laŭ lia ordono, mortigas siajn edzojn dum la nuptonokto. Ilia submonda puno: eterne verŝi akvon en senfundan barelon.

*De strigis, quae non sunt, nulla fiat mentio* (lat): Pri l' sorĉistinoj, kiuj ne ekzistas, nenia mencio estu plu.

*Eksogama:* tenanta sin al la moro: preni edzinon nur el fremda tribo.

* La duoblaj vokaloj signas nazosonon.

*Evoe'* (gr.) bakĥanalia ĝojkrio.

*Fidias'* (Phidias): la plej genia greka skulptisto (5 jc. a. K.)

*Iksiono* (Ixion): laŭ la mito, lapita reĝo, favorato de Zeus. Invitite al la Olimpa tablo, li enamiĝas al Hera. Zeus formas por sia favorato Hera-figuron el nubo, kun tiu ĉi I. generas la kentaŭrojn. Sed poste, kiam li fanfaronis pri la amo de la vera edzino de Zeus, lin puŝas Zeus en la submondon, kie li de tiam eterne rul-iĝas ligite al fajra rado.

*In laŭdem confiniorum* (lat.) Por laŭdo de l' limregionoj.

*Karibdo* (Charybdis): danĝerega abismo en la Sicilia mar-kolo.

*Komitaĉo:* serba surprizmilitisto.

*Kuruco:* hungara soldato batalanta kontraŭ la aŭstria imperiestro, precipe sub la gvido de Thököly kaj Rákóczi (dua duono de l' 17-a kaj la unua kvarono de 18 jc.)

*Korinto:* greka urbo; korinta vinbero: speco de sekvinbero.

*Larissa:* antikva urbo meze de belega pejzaĝo en Greklando.

*Mésalliance* (fr. mesaliaans'): subranga edz(in)iĝo.

*Mithras:* dio de lumo en la persa mitologio. Lia kulto, post 70. a. K. disvastiĝis ankaŭ en okcidento. Oni figuris lin kutime kiel junulon kun friga pinta ĉapo, genuantan sur virbovo kaj pikantan per ponardo tra ĝia kolo.

*Mon berger* (fr.: moo berĵe'): mia paŝtisto.

*Muĵiko:* rusa kamparano.

*Nyugat* (hung.: njugat: okcidento): Revuo de la juna hungara literaturo, ekirinta en 1908.

*Ovidio:* Publius Ovidius Naso (43 a. K. — 18 p. K.) Liaj plej gravaj verkoj: *Metamorphoses* (prikantado de mitaj transformiĝoj), *Ars amatoria* (ludema didakta poemo pri la amo), *Fasti* (festa kalendaro en versoj). Sur la zenito de lia poezia gloro lin trafas la ekzila ordono de Aŭgusto. En *Tomi*, ĉe la bordo de l' Nigra Maro li vegetis ĝis sia morto. Ĉiuj liaj petegoj, humiliĝoj, elegioj, leteroj versaj estis vanaj, Aŭgusto lin ne pardonis plu.

*Palaestra* (lat.: palestra): luktejo, ekzercejo.

*Pan:* dio de l' paŝtistpopolo de l' sudgreka Arkadio, kies kulto poste disvastiĝis en la tuta antikva greka mondo. En la postkristaj jarcentoj oni devenigis lian nomon el la greka vorto *pan* (ĉio, tuto), faris lin reprezentanto de l' tuta naturo kaj en ĉi tiu senco la kulto de Pan fariĝis simbolo de la antikva pagana gaja natur-adorado.

*Petit cabinet* (fr. pöti kabine') malgranda kabineto.

*Pécs* (peĉ): hungara urbo.

*Pindaro* (Pindaros): la plej glorata greka lirikisto (4 jc. a. K.)

*Refectorium* (lat.: refektorium): monaĥeja manĝejo.

*Sikulo:* ano de hungara gento, loĝanta en la montara orienta limregiono de Transilvanio.

*Sarmato:* antikva gento de suda Ruslando.

*Skito:* antikva gento, loĝinta dum la antikva epoko inter la Don kaj Danubo. La malnovaj hungaraj kronikoj nomas Skitio la prapatrujon de l' hungaroj kaj

tial la vorto *skito* estas ankaŭ nun uzata por signi radikan hungaron.

*Souvenir* (fr.: suvönir) memoro, memoraĵo.

*Stylus:* skribilo per kiu oni skrapis la literojn sur vakstavolon.

*Ŝamano:* tunguzdevena vorto, ĝi signifas homon komunikiĝantan kun spiritoj. La funkcio de l' ŝamano konsistas el aŭgurado, el la esplordiveno de l' vero, el kuracado kaj el spiritforpelo (eksorcismo). La ŝamanismo, kiel kulto de senpera kuminikiĝo kun spiritoj, estas trovebla ĉe multaj primitivaj popoloj, kiuj jam atingis la animisman kredon.

*Tabouret* (fr.: tabure'): malalta remburita seĝo sen apogilo.

*Teint* (fr.: teen): vizaĝkoloro.

*Tibullus:* latina lirikisto, verkinto de belegaj elegioj (59.— 19. a. K.)

*Tiburo* (Tibur): latina urbo meze de belega pejzaĝo (la nuna *Tivoli.)*

*Toupet:* (fr. tupè): rekombita kaj suprenkrispigita frizaĵo.

*Unform* (germ.): nekonvenaĵo, nedecaĵo.

*Valedicit patriae, amicis* ktp. Adiaŭas al la patrujo, al la amikoj kaj al ĉiuj, kiujn li havis karajn.

*Vicomte* (fr.: vikoont'): rango inter barono kaj grafo.

*Vicomtesse* (fr.: vikoontess'): *vicomte*-ino.

*Wales* (ŭels): Kimrujo.

*Watchful chaperon* (angl.: ŭoĉful ŝeperoŭn): akr-okula viringardisto.

*Zrinyi* (zrinji): (1508—1566) hungara heroo, defendinta la fortikaĵon Szigetvár (sigetvar) kontraŭ la turkoj; vidinte, ke la fortikaĵo ne estas plu tenebla, li kuratakis turkojn kaj mortis kune kun ĉiuj siaj subuloj. Lian morton prikantis en sia *Zrinyias* lia samnoma nepo, poeto kaj militestro.

# Bibliografio

## de la hungara literaturo en Esperanto

EN LIBROFORMO:

*Zoltán Ambrus:* La bazaro brulas. Tradukis *K. Mezei.*

*Endre Ady:* La Wagram-odo; *Lajos Biró:* La infano; *Gyula Krudy:* La prauloj. Tradukis *R. Rajczy* kaj *A. Dobler.*

*Árpád Abonyi:* Mallumaĵoj. Tradukis *P. de Lengyel.*

*Árpád Berczik:* Kiu ne povas plori; *Ferenc Molnár:* La kitklubo; *Soma Guthy:* Demandoj konfesigaj. Tradukis: *L. Loránd, I. Kelemann, F. Varga.*

*Jenő Heltai:* Gertie. Tradukis: *F. Varga.*

*Ferenc Herceg:* Marĉfloro. Tradukis *F. Göltl.*

*Ferenc Herceg:* Hungaraj rakontoj. Tradukis *A. Panajott.*

*Mór Jókai:* Du noveloj. Tradukis *J. de Luczenbacher.*

*Kálmán Mikszáth:* Fantomo en Lubló. Tradukis: *Jenő Forster.*

*Kvar noveloj* (Ferenc *Móra:* Kiam mi estis en ĉielo; Vilmos *Szigethy:* Kitelo de sankta Anna; István *Tömörkény:* Hirundoj; Mihály *Cserzy:* Sur la vojo de l' malboniĝo. Tradukis: *D. Muzsnai.*

*Sándor Petőfi:* Elektitaj poemoj. Tradukis: *E. Fuchs.*

*Hungara Poemaro* I. kaj II. (poemoj de *Petőfi, Arany, Berzsenyi, Szabolcska*). Tradukis *R. Fiedler, A. Marich, R. Rajczy.*

*Mihály Vörösmarty:* Ilonjo bela. Tradukis *E. Fuchs.*

*Ses noveloj* (de M. *Jókai,* K. *Mikszáth,* F. *Herczeg* kaj F. *Molnár*) Tradukis *J. de Luczenbacher, F. Beck, L. Bálint, A. Hanzirovics.*

*Bonhumoraj rakontoj* (de K. *Mikszáth,* V. *Rákosi,* F. *Karinthy,* F. *Molnár,* J. *Heltai,* I. *Kálnoki,* S. *Guthi*). Tradukis *P. Balkányi, E. Faludi, K. Tilkovszky, A. Hanzirovics, I. Kepes.*

*Jenő Heltai:* La paĝio de l' reĝino. Tradukis *K. Kalocsay.*

*Géza Gárdonyi:* Du kokcineloj. La montro. Tradukis *K. Kalocsay.*

*Kantanta Kamparo.* 101 hungaraj kantotekstoj. Tradukis *K. Kalocsay.*

*Imre Madách:* La tragedio de l' homo. Drama poemo. Tradukis *K. Kalocsay.*

*Sándor Petőfi:* Johano la Brava. Popolfabelo en versoj. Tradukis *K. Kalocsay.*

Poemoj de *Balassa, Csokonai Vitéz, Petőfi, Vörösmarty, Arany, Vajda, Ady* en la Eterna Bukedo de *K. Kalocsay.*

*Frigyes Karinthy:* Morgaŭ matene. Dramo. Tradukis: *K. Kalocsay.*

*Frigyes Karinthy:* Norda vento. Novelkolekto. Tradukis *K. Bodó.*

*Mihály Babits:* La cikonikalifo. Romano. Tradukis *K. Bodó.*

*Poemaro el Hungarlando.* Antologio de *F. Szilágyi.* Poemoj de *Balassa, Csokonai Vitéz, Berzsenyi, Vörösmarty, Petőfi, Arany, Vajda, Kiss, Gárdonyi, Palágyi, Vargha, Ady, Ignotus, Heltai, Juhász, Babits, Szép, Emőd, Gellért, Harsányi, Kosztolányi, Füst, Zoltán Nagy, Tóth, Lesznai, Karinthy, Gyóni, Gyagyovszky, Szabó, Várnai, Kassák, Nádass, Pintér, Mécs, Zsolt, Illyés, József, Fenyő, Simán, Tamás, Erdélyi, Sárközi, Somlyó, Pásztor, Boross, Rába, Balázs, Dán, Kér, Lanátor, G. Nagy, Szebenyi, Szolnoki.*

*Lajos Biró:* Fraŭlino Ida; *Kálmán Porzsolt:* La vojo malsupren. Tradukis: *L. Rereips.*

## EN REVUOJ.

*Ady, Endre:* Béni, la apostolo. (K. Bodó.) Literatura Mondo 1924.

*Ambrus, Zoltán:* La senorela homo. (K. Bodó.) Literatura Mondo, 1931.

*Babits, Mihály:* Fabelo el la Dekamerono. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1925.

*Babits, Mihály:* Odysseus kaj la sirenoj. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1924.

*Falu, Tamás:* Krucenigmo. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1931.

*Fóthy, János:* La poeto kaj la morto. *(K. Bodó.)* Hungara Heroldo, 1928.

*Gárdonyi, Géza:* Anĝelo en lernejo. *(L. Spierer.)* Hungara Heroldo, 1930.

*Hajnik, Miklós:* En Weimar. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1932.

*Heltai, Jenő:* Gertie *(A. Bayer.)* Literatura Mondo, 1922.

*Heltai, Jenő:* La kuracisto kaj la morto. *(L. Rereips.)* Rivista Italiana di Esperanto, 1931.

*Heltai Jenő:* Ruĝĉapinjo kaj la lupo. *(K. Bodó.)* Hungara Heroldo, 1928.

*Heltai, Jenő:* Promenado en la zoo-ĝardeno. *(L. Spierer.)* Hungara Heroldo, 1930.

*Herczeg, Ferenc:* La bubo. *(A. Bayer.)* Literatura Mondo, 1923.

*Herczeg, Ferenc:* Donna Sol. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1931.

*Jókai, Mór:* La blanka folio. *(Luber.)* La Revuo, 1912.

*Jókai, Mór:* Kiel oni almilitas la virinojn. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1923.

*Karinthy, Frigyes:* Oni desegnas min. *(P. Balkányi.)* Esperanta Finnlando, 1922.

*Karinthy, Frigyes:* Korpa beleco, Literatura Mondo 1922.

*Karinthy, Frigyes:* Li donas al mi temon. Literatura Mondo, 1922.

*Karinthy, Frigyes:* Barabbas. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1926.

*Karinthy, Frigyes:* La fremdulo. *(K. Bodó.)* Hungara Heroldo, 1928.

*Kosztolányi, Dezső:* La riĉulo. *(R. Göndör.)* Hungara Heroldo, 1930.

*Kürthy, György:* Knabeto, ĉu vi venas ludi? *(R. Göndör.)* Hungara Heroldo, 1930.

*Lovik, Károly:* Rut, la tajloro. *(L. Rereips.)* Rivista Italiana di Esperanto, 1931.

*Mikszáth, Kálmán:* La botetoj. *(P. Balkányi.)* Esperanta Finnlando, 1922.

*Molnár, Ferenc:* La kokono. *(E. Szirmay.)* La Revuo, 1912.

*Molnár, Ferenc:* Malfeliĉa amo. *(K. Kalocsay.)* Literatura Mondo, 1924.

*Móricz, Zsigmond:* La etulo. *(A. Bayer.)* Esperanta Finnlando, 1922.

*Móricz, Zsigmond:* Tragedio. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1925.

*Sándor, Kálmán:* Gaso. *(Parvus Piscis.)* Literatura Mondo, 1932.

*Szomory, Dezső:* Reĝo Richard III. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1931.

*Török, Gyula:* La majstroverko. *(K. Bodó.)* Literatura Mondo, 1925.

# Enhavo


| | | Paĝo |
|---|---|---|
| Antaŭparolo | | 5 |
| *Mihály Babits:* Studo pri la hungara literaturo | | 7 |
| | POEZIO. | |
| Masonisto Kelemen | | 26 |
| Anjo Molnár | | 27 |
| La soldato kaptita | | 28 |
| Máté Biró | | 29 |
| István Fogarasi | | 32 |
| Ilona Budai | | 33 |
| La bela Antal | | 34 |
| La serpento | | 35 |
| Ilnjo bela floro | | 36 |
| Malkuraĝulo | | 37 |
| *Balassa, Bálint:* | In laŭdem confiniorum | 38 |
| | Renkontinte Julian | 39 |
| | Valedicit patriae | 39 |
| *Csokonai Vitéz, Mihály:* | Al la Espero | 41 |
| | La makuleto | 42 |
| | Al la songo | 42 |
| | La feliĉo | 42 |
| *Berzsenyi, Dániel:* | La proksimiĝanta vintro | 43 |
| | Mia dividparto | 44 |
| *Kölcsey, Ferenc:* | Himno | 45 |
| | Vanitatum vanitas | 46 |
| *Katona, József:* | Sceno el Bán Bánk | 48 |
| *Vörösmarty, Mihály:* | Pensoj en biblioteko | 54 |
| | Antaŭparolo | 57 |
| | La homoj | 58 |
| *Petőfi, Sándor:* | Devizo | 60 |
| | Fea songo | 60 |
| | Jen ŝafisto sur azen' | 67 |

| | | |
|---|---|---|
| | Sur akvo | 67 |
| | Banas sin la luno | 67 |
| | Marĉando | 68 |
| | Mia amo: mar' muĝanta | 68 |
| | Majstro Paŭl' | 69 |
| | Se parolus Dio | 69 |
| | Ja neniam amis, kiu diras | 70 |
| | La frenezulo | 71 |
| | Ho rememor' | 74 |
| | El ĉi brila mondo | 74 |
| | Malĝojo? Ocean' giganta | 74 |
| | Malleviĝas nubo peza | 74 |
| | Vi amas la printempon | 75 |
| | Ho teda pens' | 75 |
| | Miaj kantoj | 76 |
| | La poetoj de la XIX. jarcento | 77 |
| | Kio por mi jam estis mia am' | 78 |
| | Lumon | 78 |
| | Por Laĉjo Arany | 79 |
| | Estus mi torento | 80 |
| | Valo kaj monto | 81 |
| | Vesperiĝo | 82 |
| | Sur plataĵ' de milda maro | 83 |
| | Sur mia naskotero | 84 |
| | Tri birdoj | 85 |
| | Arbeto al ventego | 86 |
| | Kial kantas vi, poetoj bonaj | 86 |
| | Je la fino de la jaro | 87 |
| | Alaŭdon aŭdas mi denove | 88 |
| *Arany, János:* | Trankviliĝo | 89 |
| | Mateno kaj vespero | 90 |
| | La kimraj bardoj | 90 |
| | Brava Bor | 92 |
| | La romanco de l' abelo | 93 |
| *Vajda, János:* | En la arbaro de Vaál | 95 |
| | El la »Memoro pri Gina« | 96 |
| | Post dudek jaroj | 97 |
| | La kometo | 97 |
| | Memorskribo | 98 |
| *Reviczky, Gyula:* | La morto de Pan | 99 |
| *Kiss, József:* | Judit Simon | 103 |
| | Fajroj | 105 |
| *Ignotus:* | Antaŭ lulilo | 107 |
| *Szilágyi, Géza:* | Dorsoj | 108 |
| | La granda krio | 108 |

*Heltai, Jenő:* La aŭrora stelo . . . . . . . . . . . 110
*Pásztor, Árpád:* Al la sklavoj de l' enuata vivo . . . . . . 111
*Ady, Endre:* Batalo kun la grandsinjoro . . . . . . . 112
Konservi vin trans ĉiu limo . . . . . . . 114
Mortoflor': la Kiso . . . . . . . . . . 114
Antaŭ princo Silent' . . . . . . . . . 115
Post maja pluvego . . . . . . . . . . 115
Sur vinmonto de jaroj foraj . . . . . . . 115
Sur tablo-trono . . . . . . . . . . . 116
Songo pri abelejo . . . . . . . . . . 116
Kie vi, Adamo . . . . . . . . . . . 117
Krucifikso en arbaro . . . . . . . . . 117
Petego pri rido . . . . . . . . . . . 117
La trombono de Dio . . . . . . . . . 118
La alveno de Dio . . . . . . . . . . 118
Maria kaj Veronika . . . . . . . . . 119
Virinoj sur la bordo . . . . . . . . . 119
La granda kasisto . . . . . . . . . . 120
La ŝtelinto de mia sorto . . . . . . . . 120
Admono al gardantoj . . . . . . . . . 121
Rememoro pri nokto somera . . . . . . 122
Kanto kronika el 1918 . . . . . . . . 123
*Babits, Mihály:* Cigankanto . . . . . . . . . . . 125
La Danaidinoj . . . . . . . . . . 127
Du fratinoj . . . . . . . . . . . 128
Naiva balado . . . . . . . . . . . 129
Vintra kanto . . . . . . . . . . . 130
Vespera demando . . . . . . . . . . 131
Nova jaro . . . . . . . . . . . . 132
Fortissimo . . . . . . . . . . . . 133
Strato antaŭtagmeze . . . . . . . . . 134
Strato vesperiĝe . . . . . . . . . . 136
Delonge forsonoris temp' de Sappho . . 137
En arbara loĝejo . . . . . . . . . . 138
Cigano en mortkondamna ĉelo . . . . . 139
*Kosztolányi, Dezső:* El la »Lamentoj de kompatinda knabeto« 140
Kvieta pura poemo . . . . . . . . 146
Kio postrestis . . . . . . . . . . 146
Bato . . . . . . . . . . . . . 147
*Juhász, Gyula:* La reviviĝinta Lazaro . . . . . . . . . 149
Anna eterna . . . . . . . . . . . 150
Sur barbsekiga benko . . . . . . . . 150
Paco . . . . . . . . . . . . . . 151
La eterna tapiŝo . . . . . . . . . . 151
L' infanon, dum li dormas . . . . . . . 152

*Nagy, Zoltán:* Vintra memoro . . . . . . . . . . . . . 153
*Szép, Ernő:* Poemo . . . . . . . . . . . . . . . 155
Soneto . . . . . . . . . . . . . . . 155
La rideto . . . . . . . . . . . . . . 156
Ĉe la dancistino . . . . . . . . . . . 157
Infanludiloj . . . . . . . . . . . . . 157
Nude . . . . . . . . . . . . . . . 158
*Karinthy, Frigyes:* La poeto . . . . . . . . . . . 160
Leciono . . . . . . . . . . . . 161
Mortinto . . . . . . . . . . . . 162
*Tóth, Árpád:* Marto . . . . . . . . . . . . . . 164
Elegio al genistarbeto . . . . . . . . . 165
*Gellért, Oszkár:* Sankta malbelo ĝi estas, amiko . . . . . 167
Adamo kun Madách . . . . . . . . . 168
La nokto de libertempa soldato . . . . . 168
*Füst, Milán:* Sur egipta tombŝtono . . . . . . . . . 169
*Falu, Tamás:* La »Patro-nia« de l' panoj . . . . . . . 170
*Várnai, Zseni:* Ĥoro en soprano . . . . . . . . . . 171
*Kassák, Lajos:* Metiistoj . . . . . . . . . . . . 172
80 . . . . . . . . . . . . . . . 173
83 . . . . . . . . . . . . . . . 173
85 . . . . . . . . . . . . . . . 174
89 . . . . . . . . . . . . . . . 174

## PROZO.

*Jókai, Mór:* Kiun el la sep . . . . . . . . . . . . . 179
*Mikszáth, Kálmán:* La verda muŝo kaj la flava sciuro . . 185
*Gárdonyi, Géza:* Pentristo en vilaĝo . . . . . . . . 200
*Herczeg, Ferenc:* Barono Rebus . . . . . . . . . . 207
*Ambrus, Zoltán:* La monaĥo predikas akvon . . . . . . 216
*Bródy, Sándor:* Tajloro Kubin . . . . . . . . . . 222
*Krudy, Gyula:* La leteroj de l' poŝtestro . . . . . . 227
*Kóbor, Tamás:* Ĉe l' rando arbara . . . . . . . . . 232
*Pekár, Gyula:* Pierrot kaj Colombine . . . . . . . . 236
*Heltai, Jenő:* La tri fratinoj Tündérlaki . . . . . . . 246
*Ignotus:* Marta biero . . . . . . . . . . . . . . 251
*Móra, Ferenc:* Kontraŭ la aŭroro . . . . . . . . . 254
*Szini, Gyula:* Amo, nenio pli . . . . . . . . . . . 258
*Molnár, Ferenc:* La unua paŝo . . . . . . . . . . . 267
*Révész, Béla:* Odoroj . . . . . . . . . . . . . . 273
*Kaffka, Margit:* Pri malnova soldato . . . . . . . . 277
*Biró, Lajos:* La duonfilo . . . . . . . . . . . . . 284
*Babits, Mihály:* Mitologio . . . . . . . . . . . . 290
*Móricz, Zsigmond:* Malriĉaj homoj . . . . . . . . . 316
*Kosztolányi, Dezső:* Esti jam denove bonfaras . . . . . 347

*Szomory, Dezső:* Ĉe Mülhausen la malĝoja oficiro . . . 360
*Laczkó, Géza:* Ĉe la bordo de l' skita maro . . . . . . 380
*Szabó, Dezső:* La porkido de la bona Dio . . . . . . . 387
*Karinthy, Frigyes:* La sama en viro . . . . . . . . . . 411
*Nagy, Endre:* Ŝtata murdejo . . . . . . . . . . . . . 416
*Falu, Tamás:* Kvin jaroj . . . . . . . . . . . . . . 428
*Nagy, Lajos:* Honto . . . . . . . . . . . . . . . 432
*Tersánszky, Józsi Jenő:* Novelo pri novelo . . . . . . . 437
*Kassák, Lajos:* Fragmento el la »Vivo de homo« . . . . . 441
*Földi, Mihály:* Place de l' Opéra . . . . . . . . . . 447

Vortklarigoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 455
Aliaj klarigoj . . . . . . . . . . . . . . . . . 457
Bibliografio de la hungara literaturo en Esperanto . . . 460

# Preseraroj

## trovitaj post preso

Pĝ. 10. desupre linio 13. Anst. *uta* legu *tuta*.
Pĝ. 10. demalsupre linio 4. Anst. *Marta* legu *Maria*.
Pĝ. 12. desupre linio 14. Anst. *ongusta* legu *bongusta*.
Pĝ. 12. demalsupre linio 3. Anst. *tacio* legu *Stacio*.
Pĝ. 16. demalsupre linio 16. Anst. *vivsekcianta* legu *vivisekcianta*.
Pĝ. 18. desupre linio 3. Anst. *nkoraŭ* legu *ankoraŭ*.
Pĝ. 25. desupre linio 3. Anst. *sanĝiĝis* legu *ŝanĝiĝis*.
Pĝ. 26. demalsupre linio 7. Anst. *Pajĉo* legu *Paĉjo*.
Pĝ. 27. demalsupre linio 1. Anst. *reee* legu *ree*.
Pĝ. 28. demalsupre linio 12. Anst. *turksultani* legu *turksultano*.
Pĝ. 38. demalsupre linio 13. Anst. *kasklumoj* legu *kasplumoj*.
Pĝ. 67. demalsupre linio 1. Anst. *i* legu *vi*.
Pĝ. 69. desupre linio 24. Anst. *arolo* legu *parolo*.
Pĝ. 86. demalsupre linio 10. Anst. *perdigas* legu *perdiĝas*.
Pĝ. 274. desupre linio 4. Anst. *fermandante* legu *fermadante*.
Pĝ. 280. desupre linio 5. Anst. *ĉefjug-* legu *ĉefjuĝ-*.
Pĝ. 282. desupre linio 12 Anst. *uta* legu *tuta*.
Pĝ. 324. demalsupre linio 13. Anst. *Nun jen* legu *Nu jen*.
Pĝ. 328. desupre linio 2. Anst. *laŭtenanto* legu *leŭtenanto*.
Pĝ. 371. demalsupre linio 7. Anst. *falado.* legu *falado,.*
Pĝ. 414. demalsupre linio 5. Anst. *miaj* legu *miajn*.
Pĝ. 444. desupre 13. linio. Anst. *kampo* legu *lampo*.

Ĉi tiu libro estas la unua, kiun donas al vi la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj sub la zorgado de Literatura Mondo. Ĉi tiu nova organizaĵo celas kreskigi la literaturon de Esperanto, celas doni valorajn librojn en la manojn de ĉiuj legemaj esperantistoj.

Tio estas la unua celo. Sed ne malpli grava estas la dua: doni malmultekostajn librojn. Jam por la unua jaro la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj donas krom ĉi tiu verko grandiozan Enciklopedion de Esperanto, tradukitan kaj originalan romanojn, unu libron laŭ elekto el certaj libroj kaj verkon pri la Moderna Arto, entute 6 librojn kun ĉ. 2000 paĝoj.

Kiel atestas tiu ĉi libro, la verkoj eldonataj estas ne nur interesaj, sed ankaŭ belaj, bongustaj kaj indaj por loko en ĉiu biblioteko. La malmultekostecon pruvas, ke la jena libro estas donata por la egalvaloro de svisaj frankoj 3.— broŝurita kaj sv. fr. 4.— bindita. Ankaŭ la aliaj libroj estas proksimume samprezaj. Tial ni ne dubas, ke vi tralegos kaj petos regularon de la Asocio en la plej proksima tempo kaj aliĝos al ĝi.

Kompreneble la gvidantoj de la organizaĵo ne volas halti ĉe tiaj prezoj kaj tiaj libroj kaj ili deziras konstante pligrandigi la kvanton de la donataj libroj por la sama kotizo de sv. fr. 13.50 respektive 17.—. La ega favoro, kiun la membroj havas, evidentiĝas en tio, ke tiuj libroj en kutima librovendista trafiko kostus ĉirkaŭ 50.— frankojn svisajn.

Eble vin interesas scii, ke laŭ la regularo de la Asocio oni devas aliĝi plej malfrue ĝis la 1-a de novembro por ricevi la librojn de AELA por malalta kotizo. Post tiu dato la libroj estas haveblaj nur por la kutima librovendista prezo.

Por sia kotizo la membroj ricevas ankaŭ apartan gazeton kvaronjare aperantan, kiu temas pri libroj en Esperanto, sub la redaktado de K. Kalocsay.

La eldonejo Literatura Mondo dum la ekzisto de ne pli ol du jaroj pruvis, ke estas eble eldoni belajn kaj bonajn librojn. Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj post ekzisto de unu sola jaro pruvos jam, ke estas eble doni belajn kaj bonajn librojn por pripagebla prezo.

Dependas de vi kaj de ĉiuj inteligentaj, literaturŝatantaj esperantistoj, ĉu ĝi povos fari eĉ pliajn miraklojn.

Ni donas al vi tiun ĉi libron: juĝu, ĉu estas inde aniĝi, ĉu estas inde varbi novajn membrojn?

Ni firme esperas, ke vi respondas jese kaj per tio ebligas tian grandiozan progreson de nia literaturo, kiu estus ĝis nun neimagebla.

Asocio de
Esperantistaj
Libro-
Amikoj
donas
por via kotizo
en 1933
ses librojn
entute
preskaŭ
2000 paĝojn,
por
malaltega
kotizo.
Petu
regularon
de
Literatura
Mondo
(A. E. L. A.)
Budapest, IX.,
Mester ucca
53, V. 7